

Numero:221.
Oktobro 2010.

18-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Oktobro

Eble ĝi estas la plej bela aŭtuna monato. Ankoraŭ tage estas agrabla vetero kaj ĝi allogas la homon promeni en la arbaro.

Mi ege ŝatas promeni tie en tiu ĉi sezono, ĉar tiam la arboj vestas kolorajn kostumojn.

Morgaŭ mi estos libera, kaj mi decidis viziti la proksiman arbaron. Senpacience mi atendas la renkontiĝon kun la naturo. Mi jam delonge ne estis tie. Certe ankaŭ nun mi estos ravita kaj kiel en baziliko mi promenados sub la arboj. La bestoj kaŝiĝantaj inter la densajn arbustojn scivole rigardos min.

Mi scias, ili bone konas min, ĉar preskaŭ ĉiu aŭtune mi faras ekskurson en la aŭtuna arbaro. Tamen ili ankoraŭ ne deziras konatiĝi kun mi, ĉar miaj kunuloj ofte kaŭzis malbonon al la bestaro.

La aŭtunaj koloroj allogas la homojn, kaj amase ili invadas la arbaron. Tiam ankoraŭ plivigliĝas la naturo antaŭ ol venos la profunda silento kun blanka, mola neĝo.

Admirinda estas la aŭtuna arbaro. Se Vi ankoraŭ ne promenadis tie, tiam nepre vizitu ĝin. Donu vian animon al tiu ĉi grandioza sento. Forlasu la bruon urbon kaj almenaŭ unu horon promenu inter la arboj.

Rigardu la belecon de falanta, flava folieto kaj meditu pri la mondo, kiu ĉirkaŭas vin.

La aŭtuna arbaro trankviligas min kaj ĝi donas eksterordinaran travivaĵon.

Venu kun mi kaj ni kune rigardu la arbaron! Tie ni trovos trankvilon kaj pacon. La arbaro estas la lasta rifuĝejo de la homaro. Ĉion manĝegas la beton ĝangalo kaj ni homoj malpurigas nian medion.

Rigardu la arbaron, kaj vi komprenos la ĝemon de la naturo. Malgranda flaviĝanta folio, kiu seke falas antaŭ viajn piedojn alportas al ni mesaĝon: „Amu la arbaron en ĉiu sezono, sed la melankolio de la aŭtuno suspektigas nian mion en la giganta universo.

-Redaktanto-



Dua gepatra lingvo

Nian gepatran lingvon ni ellernis de miaj patrino kaj patro dum longaj jaroj. En la lernejo nia lingvoscio estis pliperfektigita, por ke post niaj studoj ni povu legi kaj skribi, senĝene komuniki kun aliaj homoj.

La gepatra lingvo estas tre grava dum nia vivo. Tial ĉiu homo devas alproprigi bonege ĝin. Tamen ni spertas preskaŭ ĉiutage, ke multaj homoj povas kompreni sin tre malfacile. Mankas la vortrezoro, kion oni povus pliriĉigi per multe da legado. Sed bedaŭrinde „la moderna homo” ne havas tempon por legi literaturon. Tio estas nur maldiligenta rifuĝo de la legado.

Ni ne ŝatas legi. Ni timas de la literoj. Kion fari por ŝatigi la literaturon?

El ĝi naskiĝas la alia grava problemo. Ni hungaroj apenaŭ scias fremdajn lingvojn. Verdire en ĉiu jaroj dekmiloj komencas lerni iun mondolingvon, precipe la anglan kaj germanan.

La rezulto estas plorinda. Oni elspezas multe da mono por la multekostegaj lingvokursoj, kaj tamen fine nur kelkaj gelernantoj povas ellerni la elektitan lingvon.

Kion fari?

Laŭ mi, kiu ne ŝatas legi kaj kiun ne interesas sia gepatra lingvo, tiu ege malfacile ellernos iun ajn fremdan lingvon. Unue oni devus amigi tiun lingvon, kiun instruis al ni niaj gepatroj. La gejunuloj devus legi belliteraturon ĉiutage. Aĉa argumento, ke mankas tempo. Por legi oni ĉiam ekzistas tempo, se oni tre deziras.

La amo de la nacia literaturo malfermos pardonon, kiu kondukas al la ekonomio de la literaturo de la najbaraj nacioj. Baldaŭ oni sentos emon legi originale la verkaĵojn. Vole nevole oni komencos lerni fremdajn lingvojn.

Ekzistas lingvo nomata Esperanto, kiu estas kapabla trarompi tiun ĉi muron, kaj se ĉiu deziras sur la terglobo, tiam baldaŭ ĝi povus fariĝi nia dua gepatra lingvo.

Kiom bonege estus, se per ĝi la homoj povus komuniki egalrajte, kaj ni ne devus senti durangecon, se ni estas eksterlande kaj ni ne scias la lokan lingvon.

Eble jam ĉiu spertis tiun ĝenan situacion, kiam li ne povis kompreni sin en iu fremda lando. Esperanto povus solvi tiun ĉi problemon kaj dum kelkaj jardekoj malaperus la lingvaj miskomprenoj. Por ke tio realiĝu, ni unuanime devus akcepti la zamenhofan lingvon, kaj ĝin instrui en ĉiu lernejo.

Ŝaŝa

Ĉiela intervjuo kun Paĉjo

En Esperantujo ĉiu konas Julion Baghy (Baghy Gyula), karesnome Paĉjon. Li naskiĝis la 13-an de januaro 1891 en la urbo Szeged kaj mortis la 18-an de marto 1967 en Budapeŝto. Li estis elstara esperantisto, aktoro, poeto, verkisto, tradukisto, lingvoinstruisto. Interalie li verkis kaj redaktis la konatan kaj popularan lernolibron en la serio Tanuljunkt nyelveket Eszperantó nyelvkönyv (Ni lernu lingvojn Esperanto lernolibro)

Demandanto: Paĉjo, kial vi lernis Esperanton?

Julio Baghy: Jam antaŭ la unua mondmilito mi ekkonis tiun ĉi grandiozan lingvon, kiel interesajon. Vere tiam mi ankoraŭ ne pensis, ke baldaŭ mi sentos ĝiajn utilojn kaj gravecon en la fora Siberio pasigante miajn militkaptitajn jarojn en multnacieca lagero. Tie estis trovitaj militkaptitoj preskaŭ el la tuta mondo, kaj inter ni regis terura babelo lingvokonfuzo. En Siberio mi povis provi Esperanton ankaŭ en praktiko. Mi komencis instrui ĝin por miaj samsortuloj. Rapide, post kelkaj monatoj ni jam bonege povis komuniki unu kun la alia, eĉ ankaŭ niaj gardistoj interesiĝis pri la lingvo kaj amase lernis ĝin.

D. Mi pensas iam ĉio finiĝas kaj vi liberiĝis el Siberio. Kio okazis poste?

J. B. Ni alvenis hejmen en bovinovagonoj lace kaj malsane. Malgraŭ tio ni estis feliĉaj, ĉar ni denove estis hejme en nia patrujo.

Mi rapide alkitimiĝis al la nova vivo kaj jam en la unuaj tagoj mi serĉis la eblon enkroĉiĝi la Hungarlandan Esperanton Movadon.

Bonŝance miaj malnovaj geamikoj ne forgesis min.

Ankaŭ hejme mi aktive komencis partopreni en la movadon. Mi verkis, instruis mem la lingvon kaj mi varbis novajn adeptojn por Esperanto.

Tio estis belega epoko en mia vivo. Tiutempe ĉiam brilis suno super mia kapo. Ho, la juneco! Tio dolĉigas la vivon de la homo.

D.: Kara Paĉjo rakontu al mi pri tiuj belegaj jaroj! Min kaj la legantojn de Vesperto certe ĝi interesas.

J.B.: Mi kun miaj junaj kaj entuziasmaj geamikoj intense disvastigis la ideon de la internacia lingvo. Ni organizis diversajn lingvokursojn, kaj fondis Esperanto-klubojn en Budapeŝto kaj en multaj urboj. En la dudekaj jaroj la zamenhofa lingvo rapide disvastiĝis. Ni ĝojis kaj esperis, ke baldaŭ ĝi fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro. Tiam ĉio ŝajnis tre esperoplena kaj rozkolora. La gejunuloj amase venis por lerni la lingvon.

La movado plivigliĝis en la ĉefurbo. Mi instruis Esperanton tage kaj nokte. El la varbitaj gejunuloj fariĝis grandiozaj geesperantistoj. Dio mia, se ankoraŭfoje mi povus esti junulo, ankaŭ nun mi farus same. Mi ne elektus alian vojon. Tiuj jaroj orumis mian vivon. Mi ĝojegas, ke mi ellernis Esperanton. Kredu min, ĝi estas grandioza lingvo. Ĉiu homo devus ellerni ĝin. Se Esperanto disvastiĝus sur la tergloblo, tiam post kelkaj jardekoj solviĝus la lingvaj miskomprenoj.

Bedaŭrinde ankoraŭ nun la homaro ne rekonis la utilojn de tiu ĉi lingvo, kaj multaj homoj estas kontraŭ ĝi.

D.: Kion vi mesaĝas al la nuna junularo?

J.B.: Kion mi mesaĝas de tie ĉi, el la ĉielo? Kion povus mesaĝi la iama motoro de la Hungarlanda Esperanto Movado. Mi petas ilin, ili lernu tiom intense Esperanton, kiel ni. Eble en la dudekunua jarcento oni sugestas al ili, sufiĉas scii la anglan lingvon, kaj el la mondo malaperos la lingvaj malfacilaĵoj. Tio estas trompo, ĉar la angla estas nur nacia lingvo, kiel la multaj aliaj, kies ellernado bezonas multe da tempo kaj laceco. Ellerni tian lingvon estas ege malfacila. Nur kelkaj gelnantoj povas atingi la pinton de la lingvoscio.

Do mi mesaĝas al ne nur gejunuloj, sed al ĉiu: lernu Esperanton, ĉar mi scias, alvenos la tempo, kiam ĝi fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro.


Lernu kaj lernu, ĉar morgaŭ ĝi estos necesa!

D.: Mi dankas la interjuon.

-Johano-



Militkaptitoj ie en Siberio



Poezio

Filoj de Kaino

de Julio BAGHY

Filoj de Kaino kun la stigmo,
 mature atendas vin la rikolto!
 Faru fajron! Flagru sen estingo
 sur tero gehena flam' de malordo!
 Al ŝtiparo do moralon, virton!
 Noblajn celojn ĵetu sub la cindron
 kaj kolero lafa de la Etno
 furiozu en la detrusento!
 Ne hezitu, filoj de Kaino,
 la mondon putrantan fine renversi!
 Sciu, vian tronon por la gajno,
 milmilioj rapidos sklave tuj servi!

Filoj de Kaino, la prapatro
 ne tre favorata estis hieraŭ,
 sed nun ŝajnas, ke via "talpo-arto"
 jam estas laŭ plaĉ' de l' trono fiera,
 ĉar al vi Li donis la potencon ...
 Dum arme' de l' Bono perdas centon
 da plej noblaj koroj, -- vi triumfas,
 novajn buĉmaŝinojn zorge muntas ...
 Flugu supren do la fum' incensa
 de via altaro, gent' de Kaino,
 por konvinki Lin pri fakt' esenca,
 ke ĉi besto estas hom' nur laŭ ŝajno.

Finan venkon por la pens' Kain-a
 kun ve' mi sopiras, ho bestofrato,
 ĉar la homo, estu kia ajna,
 li celas fratmurdon per korotrafo.
 Finan venkon do anime korpe,
 ke ĉe manĝotrog' de l' sango -- porke
 glutu, gruntu ĝis satiĝo morta
 ĉi kreaĵo glora, sed plej monstra;
 ke ne pulsus koro aspiranta
 kun vea dolor' al Vero kaj Bono
 kaj ne vivu plu al kiu vanta
 sopiro pruviĝas "esti nur homo".



Samtempaj sezonoj de Julio BAGHY

Memoru, kara, jam aŭtuno estis,
 heroldis vento pri la vintra dormo,
 la nudajn branĉojn blanka prujno vestis
 kantbirdoj mutis pro la frosta morno,
 sed ni neglekte ĉion en ekstero
 sur benko sidis, ridis sinforgese;
 en ni la majan revon pri l' somero
 inspire amo teksis multpromese ...
 Ni havis for de l' trista nuno
 printempon en la aŭtuno.

Rigardu, kara, ĉerizarboj floras,
 orumas verdan boskon suno maja,
 la vintra morno jam delonge foras,
 pri juno himnas birdotrilo gaja,
 sed ni senvorte sidas sur la benko,
 tra florperdinta kampo pense vagas
 kaj ĉesas jam esperi pri la venko,
 por trokuraĝo per rezigno pagas ...
 Jes, samas bildoj, sonoj;
 nur lokon ŝanĝis du sezonoj.

Febrosongâ nokto de Julio BAGHY

Kiam la nokt' bruligas stelomeĉojn
 Kaj lunradian pompon prenas al si,
 Sopiroy ludas sur la lir' arpeĝojn,
 La koron sentoj vekas kanti, valsi ...

Aperas vi, ankora altarbildo,
 La brakojn etendante voke al mi;
 Al peksopiro venas ĉasta virto
 Por fali kaj pagane psalmi ...

"Ah, venu ... venu! Vin mi vokas, pelas
 Suferi pli la kor' ne povas plu jam.
 Jen, vidu, via sklavo ekribelas;
 Li volas havi vin aŭ morton tujan ...

Dum tikla sago de Amoro sorĉas,
 Ni mordas nin per kis' por kison gajni.
 Momentoj febraj rozoĉenon forĝas;
 En ĝi pereas vi amata kaj mi ...

Sed jen la tag' estingas stelomeĉojn
 Kaj vekas sin ĉagrenoj, zorgoj en ĝi;
 Mutigas peza jugo la arpeĝojn
 Por revteksadon de la koro -- venĝi ...

Por infanoj



AVENTUROJ EN ESPERANTUJO

Peĉjo estis okjara knabeto. Antaŭ nelonge lia avo komencis instrui al li Esperanton. La nova lingvo ege plaĉis al Peĉjo, ĉar facile kaj rapide povis lerni ĝin. Liaj lernejoj kamaradoj lernis diversajn lingvojn, sed ankaŭ post monatoj ili povis elbuŝigi nur bagatelaĵojn. Ilin ege tedis kaj lacigis la gramatiko. Ĉiu knabeto kaj knabino deziris uzi la lernatan lingvon en praktiko.

Peĉjo apenaŭ komencis lerni Esperanton, sia avo jam invitis lin al internacia Esperanto renkonto, kiu okazis en proksima, najbara urbo. Tie li tuj konatiĝis ĉarma pola knabino Kristina. Ankaŭ ŝi estis komencantino, tamen tute bone komprenis unu la alian. Ili interamikiĝis kaj promesis unu al la alia, ke ili korespondos interrete. Ambaŭ geknaboj havis retadreson kaj ĝi ege plifaciligos ilian kontakton. Se ili deziras, tiam ili povos babili ĉiutage. En la interreto estas kelkaj babilejoj, kie la novbakitaj, junaj geesperantistoj povos daŭrigi la babiladon, eĉ ankaŭ per mikrofono.

La avo estis fiero je sia nepo, kaj al ĉiu li diradis ĝoje la sukcesojn de Peĉjo.

Ankaŭ la knabeto tre ekŝatis la zamenhofan lingvon. Apenaŭ pasis kelke da monatoj kaj li perfekte povis uzi ĝin.



Vere oni ofte primokis lin pro Esperanto kaj ne kredis, ke per ĝi li povas komuniki ie ajn en la tuta mondo.

Komence tio tre ĝenis la knabeton, sed lia avo kuraĝigis lin:

-Ne ĉagrenu pro ili. Vi elektis bonan lingvon. Ne forgesiĝu pri via pola amikino!

Kun Kristina li renkontiĝis rete ĉiutage. Post la lernado en la vesperaj horoj li retumis. La kanbino ĉiufoje raportis kio okazis en la lernejo kaj en la familio. Tiuj minutoj aŭ horoj agrable pasis kaj ili eksciis multe unu pri la alia.

En iu aŭtuna vespero Peĉjo estis sola en la ĉambro kaj decidis, ke li babilados kun Kristina.

Li enŝaltis la komputilon kaj atendis. Longe okazis nenio, sed subite en la ĉambro fariĝis brila lumo. La lumo estis tiom forta, ke li devis fermi la okulojn. En la sekva momento li trovis sin en stranga mondo.

-Kie mi estas? – li demandis mire.

-Estu salutate en Esperantujo! – diris verda hometo, kiu ekaperis apud li.

Peĉjo ĉirkaŭrigardis. Ili estis sur granda, flora kampo, kaj la malproksimo vidiĝis la konturoj de urbo.

-Ĉu en Esperantujo? Ĉu ekzistas tia lando? Mi ankoraŭ nenie vidis sur la mapo. Kie ĝi estas?

La verda hometo ekridis:

-Ne serĉu ĝin sur la mapo! Esperantujo ne estas designita sur mapon. Ĝi estas ĉie, kie vivas geesperantistoj. Vi kaj via avo estas esperantistoj, tiam Esperantujo troviĝas ankaŭ en via domo.

-Ĉu ĝi estas ankaŭ en la domo de mia pola amikino Kristina – Peĉjo interrompis la parolon de la verda hometo.

-Komprenoble. Kaj ankoraŭ en multaj hejmoj estas tiu grandioza lando. Espereble de jaro al jaro ilia nombro plimultobliĝos kaj alvenos tago, kiam la tuta terglobo fariĝos Esperantujo. Tio estos fabelbelega. Ĉu ne?

La knabeto konsentis kun li kaj demandis:

-Kial mi estas tie ĉi?

-Mi atendis tiun ĉi demandon. Tuj mi klarigos al vi. Ekde tiu ĉi tago vi estas la civitano de Esperantujo, kaj dum vi parolas kaj uzas la internacian lingvon, vi rajtos loĝi tie ĉi. Mia tasko prezenti al vi Esperantujon. Nun ni ekiras malkovri ĝin. Kun mi vi venos al multaj urboj kaj vilaĝoj. Vi povos ekkoni multajn geesperantistojn. Baldaŭ vi spertos kiom grandioze estas vivi tie ĉi.

-Ĉu mi povos renkontiĝi ankaŭ kun mia amikino Kristina?

-Ĉu vi deziras, ke ankaŭ ŝi akompanu nin?

-Jes – ekbrilis la okuloj de la knabeto – Kie ŝi estas?

-Vidu, tie venas Kristina!

Efektive de malantaŭ alta, granda arbo elpaŝis ĉarma pola knabino kaj diris:

-Salut', Peĉjo? Kiel vi fartas? Mi ĝojas revidi vin en Esperantujo

-Salut', kara Kristina! Mi fartas bonege. Ankaŭ por mi estas grandega ĝojo renkontiĝi kun vi persone. Sed ni iru, ĉar nia nova amiko deziras ekiri.

Ili triope ekiris al la direkto de tiu granda urbo, kies konturoj vidiĝis en la malproksimo.

-Unue ni iras al la ĉefurbo de Esperantujo, ĉar la tiea urboestro atendas nin. Poste ankoraŭ vi travivos multe da aventuroj. Tion mi garantias al vi.

La du geknaboj estis tre feliĉaj kaj prenante la manon de la alia rapidis al la ĉefurbo. Ili estis tre scivolemaj, kiel aspektas la ĉefurbo de Esperantujo.

(daŭrigota)

-La onklo Adalberto-



Gajaj bildoj



www.netrejtveny.hu/nevjegy

Mi ne deziras lerni la anglan lingvon



www.netrejtveny.hu/nevjegy

Vi mensogis, ke vi scias Esperanton.



www.netrejtveny.hu/nevjegy

-Kial vi faris?

-Ĉar li ne deziris lerni Esperanton.



www.netrejtveny.hu/nevjegy

Ĉu vi aŭdis, Manja ellernis ankaŭ Esperanton.



www.netrejtveny.hu/nevjegy

Ĉu vi lernos Esperanton?